



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 4 • Julio/Aŭgusto 1958

Esti pli ol ŝajni!

Rilate la nombron tiu-ĉi proverbo certe estas tre konvena al la fervojistaj esperantistoj. Bedaŭrinde jes, oni devas konfesi. Kvankam ili estas tre multaj, ili publike ne fariĝas videblaj, ĉar ili estas nombritaj nenie.

La en la Germana Esperanto-Asocio notitaj esperantistoj vere ne estas ĉiuj Esperanton parolantaj fervojistoj kaj tute ne ĉiuj pri Esperanto interesatoj. Estas la malĝojiga tragiko en nia movado, ke komencantoj lernontaj nur la internacia lingvon, ankoraŭ ne membriĝas kaj la spertuloj — eĉ tiuj, kiuj ne jam estas lertaj oratoroj sed nur kapablaj al sufiĉa komprenigo — kredas, ke ili ne plu bezonas esti membro kaj povas ŝpari la dumarkan jarkotizon.

Kie alie ekzistas simila en asocio? La kantfrato ne nur aliĝas al sia kantasocio, kiam li jam estas postpaŝanta la ŝpurojn de Caruso, la ŝakludanto ne nur al sia ŝakklubo, kiam li estas taŭga sidi kune kun Aljeĥin je la sama tabulo, la pied-pilkudanto ne nur, kiam estas diskutata lia aniĝo al la nacia dekunuo aŭ la fotografisto ne nur, kiam la gazetentreprenoj jam konkure varbas je liaj bildoj, — absolute ne —, ili ĉiuj membriĝas kiel interesuloj por lerni, esti instruataj kaj fariĝi perfektuloj.

Kial ankaŭ ni esperantistoj ne agas sammaniere? Kial ni unue petas al provado, unue instruas, unue invitas al vojaĝoj eksterlanden kaj nur due riskas la decan demandon: Pardonu, ĉu ne ankaŭ vi bonvolu aniĝi al nia asocio? Kostas nur 16,66 pfenigojn po monato. Ni ŝanĝu niajn varbmetodojn. La mondo estas pli ol matura al internacia lingvo. Ni ne plu bezonas forĵeti nin pli longe. Se ni volas esti valoraj, ni devas ankaŭ kosti iom. Pro tio: Unue aliĝo al nia asocio, unue membriĝo kaj poste kiel membro en la grupkunvenoj lerni la lingvon, pliperfektigi, fariĝi adepto kaj finfine batalanto. Ni devas unuiĝi, la interesuloj kaj fanatikuloj, fariĝi granda familio.

Tial ni volas denove interesigi la novulojn kaj malnovulojn, la balancantojn kaj la eksigintojn, kaj provi reanigi ilin al nia bona afero, ekkoninte, ke nur la grand-amaso havas pezon kaj valoron. Ni ĉiujn bezonas por atingi estimon kaj ŝajnigi, kiaj kaj kiom ni estas. Ĉirkaŭrigardu ĉiu inter siaj konatoj. Serĉanto — trovonto. Ni devas amasiĝi por valorigi.

Bedaŭrinde jes!

Steinig

El la grupoj

Braunschweig. La laborsocieto Esperanto-Filmo - Germanujo, konsistanta el kelkaj kolegoj, momente okupas sin ne nur pri filmaj aferoj, sed pri tute nova tasko. Ekkestis la ideo, krei gramofondiskon, sur kiu estos aŭdeblaj konataj popolkantoj el diversaj

landoj. EFG serĉis kaj trovis ĥoron en la urbeto Northeim, kiu deklaris sin preta, studi kaj kanti diversajn kantojn. Tiu laboro estas ne nur alloga, sed eĉ ĝojiga por la ĥoranoj. Kun granda plezuro kaj sama sukceso ili ekzercas. La gazetaro jam kelkfoje

favore raportis. La Nordgermana Radio intervjuis la horestron, dirigenton kaj anojn de EFG, surbendigis elektaĵojn el la kantoj kaj dissendis tion dum 10 minutoj. La diskoj laŭplane estos haveblaj en la Universala Kongreso en Mainz resp. mendebaj ĉe kolego Rudi Biernath, Braunschweig, Ackerstraße 53 aŭ per deĵora poŝto ĉe TBI Biernath, MA Braunschweig. Gießner

Bremen. La grupo ŝanĝis sian kunvenejon kaj okazigas la grupvesperojn nun en bela ĉambro de la Transmara-Muzeo apud la stacidomo. Ĝi estas pli konvena, ĉar ĝi havas la instalaĵojn por prezenti lumbildojn kaj filmojn.

La 22an de junio ni ekskursis al amika E-grupo en Groningen, Nederlando. Parte per aŭtomobilo parte per trajno ni veturis tien dekepe kaj estis tre afable akceptataj de pli ol dekduo da nederlandaj esperantistoj. Post oficiala salutado per la UEA-delegitino kaj post komuna kaftrinkado en privata loĝejo ni estis invitataj al senpaga aŭtobus-rondveturado en la urbo. La gastigintoj faris la necesajn klarigojn kaj montris al ni ĉiujn vidindaĵojn. Sekvis rondiro perpieda en la centro de la urbo, kie mezepokaj konstruaĵoj kiel Martinikerk kaj Prinsenhof estis tre vidindaj. En gastejo ni finis nian kamaradecan kunvenon per kafo kaj bongusta glaciaĵo. Nur tro rapide pasis la belaj multaj horoj, kiuj restos al ĉiuj konvinka pruvo de internacia amikeco sole per Esperanto. Nun ni atendas la rekompencan viziton de la nederlandanoj. Steinig

Hamburgo. Nia afero en la distrikto progresas dank' al la subteno de la BSW. Per ĝia helpo ni povis aĉeti 25 lernolibrojn kaj samtempe mendi 2 ekzemplerojn de „Heroldo de Esperanto“, 1 por Lübeck kaj 1 por ni. La membrostato estas en Lübeck iom pli malgranda ol antaŭan jaron, nome 14 membroj. En Hamburgo ni estas 15. Tio estas 3 membroj pli ol antaŭe. Inter ili estas unu kol. el Berlino. Por vigili la grupojn ni intencas ankaŭ pendigi aŭsojn en multaj deĵorlokoj. Ni kunvenas nur malregule, sed ankaŭ tion ni volas ŝanĝi. En Rendsburg nova grupo estos fondota. La kontakto kun la loka E-grupo estas bona kaj fidela, sen ĝi ne estus eble ankaŭ en la estonteco havi bonajn rezultojn. Niaj kolegoj lernas Esperanton en la kadro de la ŝtata komerca kaj fremdlingva lernejo. La instruistoj s-ro Weide, polica konsilisto, lernigas laŭ ĉeh-metodo, s-ro Flemming laŭ lerneja metodo. Nuntempe 4 novaj fervojistaj lernantoj vizitas la kurson.

Kiel ĉiam multaj alilandaj esperantistoj trapasis nian urbon aŭ restis kelkajn tagojn. Vizitis nin 21 svedaj gesamideanoj teknikaj, kiuj observis la instalaĵojn de la tramo kaj la subtera fervojo. Hamburga fremdultrafikejo denove eldonis prospekton en Esperanto pri la urbo kaj haveno. Alie nia urba estos

celo aŭ preterpaso de multaj esperantistoj el la nordaj ŝtatoj vizitontaj la UEA-kongreso en Mainz. Flanke de la fervojista rondo, la Esperanto-movado bone marŝas. Por ni venas nun la tasko, varbi novajn membrojn kaj pliakktivigi la distrikton. La kondiĉoj estas bonaj kaj niaj helpantoj jam sufiĉe maturaj por nia celo. Hartjen

Memmingen. En la direkcio Augsburg ekzistas ĝis nun nur en Memmingen Esperanto-grupo. Krom tio estas kelkaj unuopaj membroj dis en la direkcia regiono. La grupo Memmingen kunvenas varie en la fervoja lernejo por studi la lingvon kaj en gastejo por distri sin kaj amuzi pere de Esperanto. Ĉar la nombro de la esperantistoj fervojistaj ankaŭ ĉi-tie ne estas tre granda ni kunvenas kune kun la lokaj esperantistoj.

Je la 22a de junio ni havis grandan okazon por praktiki Esperanton. Aligis por tiu tago nederlanda korespondantino kun siaj gepatroj. Laŭ ilia deziro ni aranĝis kunvenon kun kelkaj Memmingenanaj samideanoj. Posttagmeze la korespondanto montris al siaj gastoj la urbon kun ĝiaj vidindaĵoj. La kunveno kun la aliaj esperantistoj okazis je la 8a vespere kun granda surprizo. Ĉar ĉe alia Memmingena samideano alvenis hazarde belga amiko por „Auto-Stop“. En tiel vere internacia rondo ni pasigis la vesperon ĉe muziko en la „Schwabenhalle“ de la ekskursloko Buxheim. Post la tro rapide forflugintaj horoj oni bonkore kaj amike adiaŭis per „Ĝis revido“. Johann Barmaneter

Plattling. Dum la 20. ĝis la 25. de septembro 1956 ni gastigis sep geesperantistojn el Le Mans (Francio). Nun ni respondis la viziton kaj faris po ses gesamideanoj de nia grupo vojaĝon al Le Mans. Ni restis de la 14. ĝis la 19. de junio en Francio kaj vizitis dum la unua tago Parizon kaj dum la aliaj tagoj Le Mans. Dimanĉe la 15an antaŭtagmeze ni havis la eblecon ĉeesti la kunvenon de la francaj fervojistaj esperantistoj tieaj. Lunde la 16an vespere la esperanta grupo Le Mans kune kun la grupo de la Renault-fabriko kunvenis je nia honoro. Merkrede antaŭtagmeze ni vizitis pere de la samideanoj de la Renault-grupo la fabrikon de Renault. Vespere ni vidis la trejnadon por la 24hora aŭtomobilkonkurso.

Ni estis ĉie kore bonvenigitaj kaj abunde gastigitaj. De krizo politika ni neniom sentis. Mi vizitis ankaŭ la francan kulturdomon por Esperanto kastelon Grésillon. Ĝi situas en bela arbara regiono proksime de la urbeto Bauge. Per rebuso oni povas veturi de Le Mans rekte al Bauge (direkto Saumur). La vizito de Grésillon por ĉiu esperantisto estas konsilinda.

La restado en Francio tre plaĉis al ni ĉiuj. Ĝi estis por ni denove pruvo, ke Esperanto facile venkas la diverslingvecon kaj ĝiajn problemojn. Johann Bernhard

2a Kunveno

de la germanaj fervojistoj esperantistaj en Nürnberg
11.-12. de oktobro 1958

Adreso de la akceptejo: BSW Nürnberg, Abt. Kulturelle Betreuung
BD Nürnberg (SW 31)

Provizora programo

Sabato, la 11a de oktobro:

- 11.00-13.00 Estrarkunveno; trafikmuzeo Nürnberg
- 15.00-18.00 Kunsido de la subsekcioj; trafikmuzeo Nürnberg
- 16.00-18.00 Gvidado tra la trafikmuzeo Nürnberg
- 20.00-22.00 Festvespero en la festsalonego de la trafikmuzeo Nürnberg

Poste senĝena kunveno en gastejo.

bv. distranĉi

bonvolu turni

Aliĝilo

Mi aliĝas al la 2a jarkunveno de la germanaj fervojistoj esperantistaj en Nürnberg.

1. Familia-kaj antaŭnomo: _____

2. Profesio: _____ Dejorejo: _____

3. Poŝtadreso: _____

4. Akompanos min mia edzino /-filo / filino *)

5. Mi deziras ĉambron de 11./12. de okt. (luprezco ĉ. 4,00—8,00 GM)
unulitan / kun 2 litoj / kun pluraj litoj *)

Mi deziras loĝi kun _____ se eblas

6. Alveno en Nürnberg antaŭvideble: _____

Dato: _____ Subskribo: _____

* Forstreku la nedeziritan

bonvolu turni

Dimanĉo, la 12a de oktobro:

- 8.45- 9.30 Referato pri la pasintjara laboro kun diskutado
- 9.30- 9.50 Parolado: el la praktiko por la praktiko
- 9.50-10.00 Resumo (germanlingve)
- 10.00-10.15 Paŭzo
- 10.15-11.00 Praktika instruado pri gramatika temo
- 11.00-11.45 Diskutado
- 12.00-13.00 Komuna tagmanĝo en la kantino Nürnberg Rbf
- 13.30-16.00 Gvidado tra la urbo en grupoj. Fine de la gvidado je la 15a aŭ 16a h la partoprenontoj ree estos ĉe la ĉefstacidomo kaj atingos la trajnojn al ĉiuj direktoj.

Ĉiu partoprenonto ricevos la detalan programon en la akceptejo.

Informoj: Ni petas

1. Aliĝon ĝis la 30. 9. 58 plej malfrue per dejora poŝto al BSW Nürnberg, Abt. Kulturelle Betreuung, BD Nürnberg (SW 31) aŭ per oficiala poŝto Bundesbahn-Direktion Nürnberg, Abt. Kulturelle Betreuung (SW 31)
2. Kotizon de 1,- GM po persono, pagenda je la alveno en la akceptejo

(Bonvolu doni la petitajn detalojn komplete kaj preslitere aŭ skribmaŝine)